


**Ĉu vi bone zorgas
pri via cerbo?**

Novajo en la libroservo!



Atako en Budapeŝto
Aŭtoro: J.M.Progiante
Eldonis: EASP, 2023

Erno estas cigana knabo, kiu loĝas en urbeto de Hungario. Unu tagon li vidas en la televido knabinon parolantan kun ĵurnalistoj. Ŝi estas Roza, unu el la infanoj kiuj travivis la ŝtelon de la fama diamanto Blua Sonĝo. Li decidas, ke li bezonas konatiĝi kun tiu inteligenta, kuraĝa kaj bela knabino, tamen li ne scias, ke tiu deziro metos lin en la mezon de terorisma operacio, en Budapeŝto, la vidinda ĉefurbo dividita de la rivero Danubo.

easp.org.br/libroservo

Enhavo

- 4 | Vortoj de la redaktanto
Kleriga sed nemulteĉeesta
- 5 | Vortoj de la prezidanto
Ĉu nur virtuale?
- 6 | Kino kaj aliaj artoj
Okja
- 7 | Kovrilartikolo
Ĉu vi bone zorgas pri via cerbo?
- 10 | Movade 1
Bela kongreso, tamen eta. Kial?
- 12 | Fabele
La valoro de almozo
- 13 | Movade 2
E-o en la libro-bienalo en Rio
- 14 | Por iom pripensi
Patro-Patrino-Vivo
- 17 | Movade 3
Esperanto en la Nacia Biblioteko
- 18 | Novele
Mobilkoj
- 22 | Recenzo
La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj aventuroj
- 23 | Lingva angulo
La 10-a Oficiala Aldono



64-a jaro n-ro 183 2023:5

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2023

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Kleriga sed nemulteĉesta

Pasis la 15-a kongreso de EASP, en bonega etoso, alta lingvonivelo, eminenta enhavo – kaj tamen kun malmultaj ĉeestantoj. Legu komenton pri tio en ĉi tiu numero de la revuo. Por kompensi foreston de karaj gesamideanoj, ni decidis publikigi ĉi tie kelkajn tekstojn de prelegoj faritaj en tiu agrabla evento. Mi esperas, ke ili instigos pli multenombran partoprenon en la proksima jaro. Por plivigliĝi nian movadon, EASP planas realigi entuziasman Zamenhofan Feston en decembro

2023. Pretigu vin por alveno al la sidejo!

Ankaŭ la kulturkunsidoj de nia ŝtata asocio regule okazas, ĉiam en la posttagmezo de la lasta sabato de ĉiu monato. Ankaŭ al ĉi tiuj ni kore invitas vin. Niaj virtualaj agadoj tute ne devas nuligi la ĉeestajn renkontiĝojn. Venu al nia sidejo!

Kaj ne forgesu dissendi nian Lampiron al viaj konatoj!

Paulo Sergio Viana



Unu el plej interesaj prelegoj prezentitaj dum la kongreso de EASP estas spektebla en la jutuba kanalo de la asocio: <https://youtube.com/@Vivagazeto>

Ĉu nur virtuale?

Karaj legantoj,

kun granda prezuro mi skribas al vi, kiuj estis, estas kaj estos kun ni por lernado, partoprenado, kaj disdonado de viaj ideoj. Mi deziras al vi grandan momenton de paco.

Je la 30-a de septembro kaj 1-a de oktobro 2023, okazis en la urbo Mogi das Cruzes, en Ŝtato San-Paŭlo la kongreso de EASP. La sidejo estis donita senpage de Prezidanto de Asocio de Serĝentoj kaj Subleŭtenantoj de la Militista Polico de Ŝtato de San-Paŭlo.

La kongreso estis sukcesa, se oni konsideras, ke ĝi estis la unua sendependa en nia ŝtato, farita post la pandemio. (Fakte, la unua post la pandemio okazis kune kun Brazila Kongreso de Esperanto, kaj estis mirinda.)

Mi pensas, ke ni devas labori por pli da partopreno de la Esperntistoj en la ŝtato.

Kion vi povas diri?

Venu viziti EASP kaj donu al ni vian ideon, vian kunlaboradon, vian agadon. Ni unuiĝu por Esperanto!

Ĉu nia movado devus esti nur virtuala? Kiel ni uzu nian sidejon?

Mi demandu: Chu vi povas helpi nin?



Esmeraldo Aparecido de Alencar

Originala nomo: *Okja*

Direktoro: *Bong Joon- Ho*

Aktoj: *Paul Dano, Tilda Swinton,
Jake Gyllenhaal kaj Seo-Hyeon Ahn*

Landoj: *Usono kaj Sudkoreio, 2017.*

Hodiaŭ mi verkos pri filmo, kiun mi hezitis spekti dum multe da tempo. Finfine antaŭ iom da tempo mi fine kuraĝis. Ĉu vi jam aŭdis pri la filmo kiu nomiĝas Okja? Se vi jam spektis ĝin, aŭ konas pri kio ĝi pritraktas, vi jam komprenas la kialon de mia hezito. Ĝi certe estas kortuŝa, sed ĝi estas ankaŭ sufiĉe doloriga pro la temo.

Sen pli da prokrasto, mi rakontu pri kio ĝi temas. Imagu ke en iu momento en la mondo, ekzistas ia genetika entrepreno kiu kreas iun grandan beston. Post iom da selektado, tiuj bestoj iĝas tre grandaj kaj kelkaj nomas ilin “su-

per-porkoj”. Eĉ estas konkurado inter kelkaj el ili por vidi kiu pli kreskos inter ili. Tro granda fanfaronado, por unu nura celo - manĝi ĝian karnon. Ĉu ilin mortigante aŭ ilin torturante per prenado de peco post peco de ĝia karno. Senetika kaj ĉefe kruela entrepreno.

Sed ili ne imagis ke Okja, unu el tiuj bestoj, estas tre proksima al Mija, knabino kun kiu ĝi kreskis dum kelkaj jaroj en paca montara regiono de Sud-Koreio. Kaj ŝi ĉion faros por porti sian amikon denove hejmen. Mija neniam eliris de tie kie ŝi loĝas, sed pro Okja ŝi trapasos eĉ danĝerajn aventurojn.

Mi invitas vin akompani tiun kortuŝan historion. Vi ja povas imagi kiaj estis la reagoj de la spektantaro – mi imagas ke kelkaj veganiĝis, eĉ se portempe! Bonan spektadon kaj ĝis la sekva fojo!

Anna Lobo de Carvalho

okja

A FILM BY
BONG JOON HO

TILDA SWINTON
AND PAUL DANO
AND JAKE GYLLENHAAL



OFFICIAL SELECTION
COMPETITION
FESTIVAL DE CANNES

Ĉu vi bone zorgas pri via cerbo?


(Prelego prezentita en la 15-a Kongreso de EASP)

Homoj ordinare atentis pri preventaj zorgoj pri sia korpo. Ili zorgas pri sia koro, pri sia stomako, pri siaj renoj, pri sia haŭto. Sed malofte oni aŭdas, ke homoj zorgas pri sia... cerbo! Foje oni vidas maljunulojn, kiuj solvas krucvortenigmojn, en la supozo, ke tio sufiĉas. Nu, krucvortenigmoj ja estas bonaj ekzercoj, sed oni povas vaste ampleksigi la preventajn sintenojn rilate la cerbon.

KORPEKZERCOJ KAJ LA CERBO

Ordinare oni supozas, ke korpekzercoj bonfaras al la koro kaj al la pulmoj. Tamen, ankaŭ por la cerbo ili estas esence gravaj. Ili konservas la volumenon de la cerbo, la kognan kapablon kaj la memoron. Luj fakuloj supozas, ke tiu bonfaro rezultas de la aperado de molekuloj protektantaj la organon: “katepsino B” kaj “neŭrotrofia cerbo-faktoro”.

Kiom da korpekzercoj estas necesaj por atingo de tiu rezulto? Eĉ nur kelkaj



minutoj ĉiutage bone efikas. Sed ideale, oni devus piediri (iom pli vigle ol dum simpla promeno) almenaŭ 150 minutojn en ĉiu semajno. Tio signifas: po 30 minutoj de lundo ĝis vendredo, kun ripozo en semajnfinoj. Ankaŭ aliaj ekzercoj, kiel naĝado, biciklado, dancado kaj gimnastikado estas same sanigaj.

LERNADO KAJ LA CERBO

Oni multe aludas al la efikeco de lernado de lingvoj rilate la cerbon.



Tamen, sciencaj studoj pri tio estas ankoraŭ kontraŭdiraj. Lastatempaj esploroj montris, ke se maljunuloj (65-jaraj) havas bonan kognan kapablon, tiam ili ne gajnas per lingvolernado pli da cerba kapablo. Tamen, eble okazas, ke se maljuna homo komencas perdi sian kognan potencon, tiam lingvolernado estas efika por ĉesigi tiun perdon. Tio validas ankaŭ por lernado de aliaj studobjektoj. Validas ankoraŭ la regulo: laborigu vian cerbon! Kaj la homoj devas havi diversajn interesojn en sia vivo.

MUZIKO KAJ LA CERBO

Rilate al muziko, la sciencistoj estas multe pli konsentaj: aŭskultado de muziko trankviligas kaj favoras la ĝeneralan psikan funkcion. En ĉiuj aĝoj, kaj eĉ dum operacioj, kaj por

demencaj pacientoj. Ĝi plibonigas la memoron kaj mildigas streson, kaj povas revigligi homojn. Oni eĉ jam preskribis ian “efikon Mozart” je la menso-stato de regulaj aŭskultantoj de tiu komponisto.

Muziko devus esti ĉiutaga parto de nia vivo.

MEDITADO KAJ CERBO

Ankaŭ rilate al meditado la sciencaj studoj estas iom kontraŭdiraj. Simile al lernado de lingvoj, eble ĝi funkcias pli bone kiel protektanto al homoj, kies cerboj komencas perdi kognan kapablon (e ĉ se ne temas pri demenco, entute). Rilate al plene sanaj cerboj, oni ne rimarkas ian evoluon en la cerbaj kapabloj. Medicinistoj tamen emfazas la bonfaran efikon de la tiel nomata “cerba higieno”: kelkaj minutoj en ĉiu tago, dum kiuj oni ripozigas la cerbon, evitante pensi pri problemoj, “malplenigante” la menson. Ekzistas pluraj manieroj praktiki meditado, kaj oni memoru, ke aŭskultado de muziko, regulaj spirekzercoj, preĝado kaj jogo povas same efiki. Same kiel brosi la dentojn kaj sin bani, ĉiutage. Nuntempe, oni krome tre valorigas la tiel nomatan “spiritualecon” en medicino.

DIETO KAJ LA CERBO

Dieto estas grava por la cerbo. En-glutado de industrie troprilaboritaj nutraĵoj povas severe ĝin damaĝi - jen ĵusa eltrovo. Kiu ajn estas la dieto, la ora regulo estas: manĝu modere, ĉar obezeco rilatas al perdo de volumo de la cerbo.

Inter ĉiuj dietoj pristuditaj, la mediteranea dieto montriĝis ĝis nun la plej saniga: multe da folioj kaj legomoj, fiŝo, grajnoj, olivoleo, fruktoj kaj mal-multe da ruĝa viando.

Nutempe ekzistas eĉ nova medici-na fako – dieto-psikiatrio –, kiu celas konsili al pacientoj carbosanigajn nutraĵojn. Verdaj folioj, kurkumo kaj fermentitaj nutraĵoj (jogurto, ekzemple) estas ofte rekomendataj. Ankaŭ amara ĉokolado. Rilate al alkoholaĵoj, la nuntempaj esploroj indikas, ke “ne ekzistas sekura kvanto da alkoholaĵo rilate al la sano”.

SOCIA VIVO KAJ LA CERBO

La homaj rilatoj estas esence gravaj por la cerba sano. Familianoj kaj ge-amikoj, kaj aktiva socia vivo forte influas la psikan staton. Ĉi-rilate, la Universitato de Harvard plenumis la plej longan studon pri “feliĉo” en la

mondo. Ĝi komenciĝis en la jaro 1938 kaj akompanis milojn da homoj ĝis alta aĝo, por taksu faktorojn, kiuj kondukas al sento de feliĉo en la vivo. Oni konkludis, ke ili estas du faktoroj: aktiva zorgado pri la propra sano kaj konservado de amaj rilatoj kun aliaj homoj. Soleco kaj izoligo montriĝis kiel venenaĵoj al la cerbo. Jen objektiva indiko pri la maniero, kiel oni devas prizorgi maljunulojn.

Paulo S. Viana



Bela kongreso, tamen eta. Kial?

Je la 30-a de septembro kaj 1-a de oktobro 2023 okazis la 15-a Kongreso de EASP, en la ĉarma urbo Mogi das Cruzes. Ĉeestis apenaŭ dudeko da geesperantistoj. Eble negative rekorda kvanto da partoprenantoj. Kial tio okazis?

La evento okazis en facile atingebla, agrabla urbo; la kongresejo estis komforta kaj taŭga; la organizo estis ĝusta kaj akurata; la programo estis (almenaŭ laŭ la opinio de la ĉeestintoj) riĉa, interesa kaj diskutoveka; eĉ la vetero estis milda kaj konvena. Kial do ĝi allogis tian malgrandan publikon?

Altnivelajn prezentojn oni povas elstarigi:

- James Piton klare kaj klerige informis pri la evoluo de la latina alfabeto;
- José Mauro Progiante didaktike parolis pri mitoj kaj faktoj rilate Artefaritan Intelekton;
- Cristina Graaf bele kaj bonhumore montris la historion sub la fama komponaĵo “Carmina Burana”;

- Alex Cesário analizis rakontojn de la itala verkisto Dino Buzzati;
- Wilian Gomes seminariece kaj entuziasme montris “kiel instigi, ke Esperanto-komencantoj ekparolu”;
- Emílio Cid sendis pensigan videon pri ”Artefarita Intelekto”;
- kaj krome okazis intervjuo kaj ateliero pri tradukado, kun vigla partopreno de la ĉeestantaro.

Oni lanĉis du novajn librojn: ”Atako en Budapeŝto“, porjunula verko de J. M. Progiante; kaj ”Helena“, de Machado de Assis, esperantigita de Paulo S. Viana.

Oni povus do aserti, ke la kongreso konsistis el unu kaj duono de tago plenaj de pensigaj programeroj. La etoso estis trankvila, amika, kaj la lingvonivelo de la prezentoj estis alta. Jen tia estis la sento de ĉiuj, kiuj partoprenis.

Kial do tiel malmultaj partoprenintoj? – mi ripetas la konsternan demandon.

Ĉu Esperantistoj jam ne interesiĝas pri kongresoj? Tiukaze, per kio anstataŭigi ilin?

Ĉu EASP ne sufiĉe propagandis la eventon? Dubinde, se oni konsideras la agadon en la sociaj retoj.

Ĉu la pandemio estigis la nevenkblan emon resti hejme kaj partopreni nur virtualajn eventojn? Dubinde, ĉar ĉiuj Esperantistoj, al kiuj oni demandas pri la graveco de ĉeestaj kunsidoj, respondas pozitive.

Fakto estas, ke EASP troviĝas en delikata momento de sia ekzisto. Ĉu ĝi devus tute reformuli sian agadprogramon? Ĉu serĉi aliajn vojojn favore al nia Esperantomovado? Ĉu trovi pli allogajn manierojn revenigi la samideanaron al la iam fervora, amika kunvivado?

Mi ŝatus ricevi opiniojn de la samideanoj.

Paulo S. Viana



La valoro de almozo

Malba Tahan (speciale por "Gazeta Commercial", dato nekonata)

Almozpetanto apud la pordo de granda moskeo iam faris al la Plej-altulo la jenan preĝon:

— Sinjoro! Faru el la unuaj almozoj, kiujn oni donos al mi hodiaŭ la saman valoron, kiun ili havas antaŭ viaj okuloj!

Iom poste preterpasis la moskeon riĉa ŝejko, sekvata de amikoj kaj admirantoj. La fiera islamano prenis manplenon da ormoneroj kaj celante mirigi la kunulojn ĵetis la brilajn monerojn al la piedoj de la maljuna almozulo. La malfeliĉulo, kun dankemo, tri fojojn kisis la grundon, sur kiu paŝis la nobelulo.

Kiam li provis kolekti la monerojn, kiujn li ricevis de la riĉa piediranto, li tamen rimarkis, kun neesprimebla surprizo, ke ili fariĝis sekaj folioj!

Tuj komprenis la almozulo – rememorante la preĝon, kiun li ĵus faris – ke tiu mirakla transformiĝo estis farita de

Alaho, la Ĉiopova: la moneroj donacitaj de la fiera ŝejko valoris ne pli ol sekajn kaj senutilajn foliojn, kiujn la vento trenas, dispecigas kaj polvigas.

Kaj la almozulo, spertante profundan tristecon, priploris sian malĝojan sorton.

Preterpasanta humila teksisto kompatis la situacion de la malfeliĉa almozpetanto kaj donis al li manplenon da daktiloj, ĉar la teksisto mem ne havis eĉ kupran dinaron.

Tiam okazis nova miraklo: la donitaj daktiloj de la teksisto, apenaŭ tuŝante la manojn de la almozulo, fariĝis perloj kaj rubenoj.

Laŭdata estu Alaho, la Justa kaj Kompatema! Almozo parade donita estas, antaŭ la okuloj de Dio, kiel seka folio de la vojo; la pia groŝo, tiu valoras pli ol ĉiujn trezorojn de kalifo!

(Esperantigis James Piton)

E-o en la Libro-Bienalo en Rio

De la 1-a ĝis la 10-a de septembro 2023 okazis en Rio unu el la plej grandaj kaj gravaj kultur-eventoj en Brazilo, la 21-a Bienalo de Libro. La evento festis nun sian 40-jariĝon, kun la temo “Elastaj Legaĵoj”, kiu elstarigas la gravecon de rakontado, sendepende de platformoj, sed kun evidenta emfazo je libroj. La intenco estas formado de nacio da legantoj. La administraj instancoj de la urbo donis al la evento laŭleĝan statuson de Nemateria Kultur-Riĉaĵo.

Esperanto-stando funkciis dum la tuta evento. Volontuloj deĵoris dum la tuta tempo kaj disdonis flugfoliojn. Miloj da vizitantoj ricevis bazajn informojn pri nia lingvo kaj ties movado. Kvankam la ĉefa iniciato venis de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, decide helpis ankaŭ Brazila Esperanto-Ligo kaj finance helpis Universala Esperanto-Asocio.

Ĝi estis laŭdinda agado, se oni konsideras, ke la koncerna publiko — amantoj de libroj — estas aparte taŭga publiko por informado pri la Internacia

Lingvo. La aktivuloj en Rio jam sin preparas por la proksima loka bienalo, en 2025, kiam Rio-de-Janeiro elstaros kiel Monda Ĉefurbo de la Libro.



Patro-Patrino-Vivo

ukisto, konferencisto, filozofo, Huberto Rohden (1893-1981) publikigis preskaŭ centon da libroj. La proponanto de la “universika filozofio” analizas verson post verso la faman preĝon proponitan de la Majstro en *Metafiziko de Kristanismo*: la animo de Jesuo rivelita en “Patro-nia”. Inspirita de tiu koncepto, mia celo estas nur registri la impresojn sur mia spirito de alia preĝo, kies originaj vortoj aperas kursive. Ili estis publikigitaj en *Leteroj de Kristo*: Manifestacio de la Krista Konscienco, Letero 8 (Eldonejo Almen-dra) kaj en la teksto 17 (dua volumo), nome *Komplementaj Tekstoj*.

“PATRO – PATRINO – VIVO, vi estas mia vivo, mia konstanta apogo, mia sano, mia protekto, la plena konten-tigo de ĉiuj miaj necesoj kaj mia plej alta inspiro.

Simpla kaj esprimplena, la elvoka formulo en la persona plano memor-igas nian koncipadon, niajn surterajn patrojn. En la plej ampleksa plano, ĝi montras la *Kreivan Universalan Unuon* Patro-Patrino kaj ĝian frukton – la Vivo laŭ ĝia majuskla esprimo, mistera kaj

funkcia. *Mia vivo* estas tiu Tri-unua Tutajo. La aliaj elementoj, nome *konstanta apogo, sano, plena kontentigo de ĉiuj miaj necesoj, plej alta inspiro*, ĉio sugestas la agantan funkciecon. La aldono de la vorto *mia* rilatiĝas al la homa Egoo – eco de posedo. Rimarku, ke ne temas pri deziroj, volo, celoj de tiu Egoo kontentigotaj, sed pri legitimaj necesoj de vivantuloj. Krom tio, la Fonto, nia *plej alta inspiro*, Sin rivelas en ni. Ne estas mi (Egoo) kiu spiras, sed Mi estas la Universala Spiro mem. Ne hazarde *inspiro* havas duoblan sencon.

Petas mi, rivelu Vian veran Realon.

La peto implicas la rekonon, ke kion mi perceptas estas iluzio, ŝajno, fenomeno. Tio implicas alian dimen-sion – la vera Realo, kiu ne estas alia ol *Vi, kiu estas la Tuteco*. La dueco, *Mi-Vi, Subjekto-Objekto* kontaminas la ordinaran sintakson. Kaj tio konsistigas la lingvaĵon en la Tria Dimensio. La invito estas por silentigi la Egoon. Nur tiel ni havos la konsekritan formulon de la Unuo – *Mi Estas kio Mi Estas*, sen adjektivoj, Absoluto videbligita kiel *Konscienco* manifesta, tio estas, *Unuo*.

Scias mi, ke Via VOLO estas, ke mi estu plene lumigita kaj ke mi povu pli bone ricevi la konsciencan de Via Ĉeesto en mi kaj ĉirkaŭ mi.

Kiam mi memoras ke mi estas Konscienco Patro-Patrina-Vivo provizore okupanta tiun korpon, kiu al mi permesas esprimi la Eston, la frazo sencas. *Diri mi scias, ke Via VOLO...* ŝajnas pretenda, escepte se estos alia koncepto pri kiu mi estas, se mi perceptos, ke mi estas ĉelo de ĉi tiu Planedo, konscia ero en la sistemo, kie mi ekzistas, moviĝas kaj Estas. *Pli bone konscii pri Via ĉeesto ĉe mi kaj ĉirkaŭ mi.* Ni relegu la frazon sen la lingvaj apartaĵoj montritaj. Nur en la koro, kies vibraj frekvencoj estas pli intensaj kaj kun plia atingeblo, mi sentos la veron. La pronomoj nur ludas la ludon de la iluzio. La malpli granda lumo de mia koro, unuiĝinta al la plej granda Lumo de la Suprema Koro, igas nin sentebraj al la Realo de la Ekzisto, evidentiĝas provizora la loĝejon de la Vera Esto, kiu mi estas, sen tempo, spaco, nek cirkonstancoj.

Kredas mi kaj scias, ke tio eblas.

Kredi devenas el nia kunnaskita scio. En la supramensa korpo, ĉio estas ebleco, senlima potencialo. En la ondoj de eblecoj, mi atestas la kolapson de la formo, kelkaj konstituas tion, kiun mi nomas *mia vivo*, kun sia ab-

soluta apartaĵo kaj cirkonstancoj, kiun mi allogas, devenantaj de kontaminataj deziroj de egoo-distordoj, ansiantaj daŭri. Do mi forgesas, ke ankaŭ mi estas transcendo, legitima dimensio, kiun mi lernas manifesti.

Kredas mi, ke Vi min protektas kaj min gardas en la perfekta AMO.

Vivoprotektado, propraĵo de la unuo Patro-Patrina-Vivo, estas atributo, kiaj nutrado kaj sano. En Naturo, sovaĝaj bestoj, se homoj ne interniksiĝos, ĉiam havos abundon de tio, kiu konstituas ilian manĝoĉenon, ŝirmilon en grotoj kaj kavernoj, savitaj de ceteraj predantoj. Ili ripozos sine de Amo, Leĝo de Vivo. Senarbarigo kaj invado de ilia *habitat* malekvilibras ne nur tiun biomon, sed ankaŭ la ceterajn, ĉar ĉio interkonektiĝas sur Geo.

Scias mi, ke mia fina celo estas VIN ESPRIMI.

La trompo de la moderna percepto tuj riveliĝas. Ĉu *mia celo* ja estas mia? (kurioza tiu verbo de la semantika sfero de *posedo*). Neeblaĵo! Ajna ĉelo, kiu insiste manifestu sian volon kontraŭ tio, kiun R. Sheldrake nomas *morfogenetika kampo*, tuj ricevos la viziton de limfoĉeloj, komisiitaj purigi ĉion kio estu ne-mi. La atako al la freneza tumora ĉelo kun ĝia dezirego

senfine multobliĝi elaĉetos la harmonion, ekvilibron kaj vivon. Nu, la *fina celo estas VIN ESPRIMI*, ĉar mi estas sparko de Via Esto – tio kiu mi estas.

Kiam mi alparolas vin, mi scias, ke Vi estas perfekte akceptebla al mi, ĉar Vi estas la AMA UNIVERSALA INTELIGENTO, kiu mirinde konceptis tiun mondon kaj ĝin videbligis.

Ĉu estas iu *mi*, kiu alparolas *vin* kaj kiu scias pri tiu parol-akceptebleco. Tamen, ne eblas esti alimaniere. La metaforo, ĉikaze, ne sidiĝas sur *simileco*, kiel kutime, sed sur *identeco*. Samas, ĉu la frazo estas legata kaj sentata kiel *Vi estas la UNIVERSALA AMA INTELIGENTO* aŭ *Mi estas la UNIVERSALA AMA INTELIGENTO*. La principo de identeco Mi-Vi, UNIVERSALA AMA INTELIGENTO, inkludas kaj ĉirkaŭprenas tiun ŝajnan dikotomion, ĉar ĝi mem *konceptis tiun mondon kaj ĝin videbligis*. Nu, videbligi estas manifesti Nemanifestaĵon, tio estas, la Unuo mem, kies nomo estas *INTELIGENTA AMO* kaj *AMA NTELIGENTO* de Patro-Patrino manifestas VIVO-n.

Scias mi, ke kiam mi Vin petas alparoli min, mi sendas lumradion de konscienco al Via Dia Konscienco kaj kiam mi aŭskultos, Vi eniros en mian homan konsciencon kaj venos pli kaj pli proksime al mia spirito kaj koro, pli kaj pli akcepteblaj.

Plifoje jen Unueco en diverseco, eĉ se diverseco ŝajnigu eldiranton kaj eldiraton de komunikado. Ĉu ekzistas tiu supozebla komuniko inter *Vin petas*, unuflanke, kaj *alparoli min*, aliflanke? Nu, tiuj supozeblaj du flankoj konsistas ununuran kaj solan Realon, tiu, kiu mi petis esti al mi rivelata. Do, ne estas komuniko, sed komunio. Kiam mi aŭskultos kaj vivos miakore la Saĝecon de Esto, kiu estas, tiam, *mia homa konscienco kaj mia spirito* estos en la unuo de la Spirito en kiu ni vivas, moviĝas kaj estas. Kiam, finfine, tiu ŝajna milagro okazos? Certe kiam Tio veros al mi, dum harmonia kaj ama interagado kun ĉiuj miaj similuloj: la lasta celo, kiu ne estas mia, nek via, sed de ĉiu vivantulo sine de Patro-Patrino-Vivo.

Mi konfidas mian eston kaj vivon al Viaj zorgoj”.

Nur dirmaniero ornamita de personaj kaj posedaj pronomoj diros tion, kiu estas nepersona kaj libera de posedoj – Vivo. *Mia vivo kaj mia esto* ĉiam estis ĉe *Viaj Zorgoj*. Nur la Unuiga Konscienco estas la *fadeno*, kiu teksas en mi la eston, nekudrita tuniko menciita de la Majstro. Ĉikaze, *fidi* estas *fidi kun* – *konfidi*. Nenio timenda do, se kune mi fidas, konfidas, se ni, finfine, teksas en komunumo la Komunan Unuon de la Vivoteksaĵo.

Paulo P Nascentes

Esperanto en la Nacia Biblioteko

Je la 19-a de oktobro 2023 okazis en Rio-de-Ĵaneiro grava agado de Esperantistoj. Pro iniciato de Esperanto-Asocio de Rio-de-Ĵaneiro, reprezentantoj de diversaj Esperanto-institucioj, entute 12 personoj, vizitis la sidejon de la Nacia Biblioteko, kaj estis oficiale akceptitaj de ĝia prezidanto, akademiano (de Brazila Akademio de Beletro), Marco Lucchesi.

Brazilan Esperanto-Ligon reprezentis Querino Neto, ĝia prezidanto; Brazilan Esperantistan Junularan Organizon reprezentis ĝia prezidanto, Miguel Bento; Kulturana Kooperativon de Esperantistoj, Givanildo Costa; Esperanto-Asociacion de San-Paŭlo, Paulo S. Viana; AERĴ kaj Eldonejon Lorenz, Álvaro Motta; kaj Niteroi Esperanto-Klubon, Walter Fontes. La grupo alportis en formala maniero kelkajn librojn por donaco al la Biblioteko, kun manskribitaj mesaĝoj.

Prezidanto Lucchesi, kiu estas honora membro de Universala Esperanto-Asocio kaj flua parolanto de nia

lingvo, afable akceptis la grupon, fervore apogis la iniciaton, kaj proponis gviditan viziton al la sidejo. Krome, li preparigis ekspozicion de libroj, kiuj jam estas parto de la kolekto de Esperantovolumoj troviĝantaj en la Nacia Biblioteko. Certe oni devas pligrandigi tiun kolekton!

La oficiala retejo de la Nacia Biblioteko bele informis pri la vizito.

Paulo S. Viana



De maldekstre: Miguel Bento, Querino Neto, Givanildop Costa kaj Marco Lucchesi.

Mobilkoj

Trinki! Triiinki... Mi volas trinki kruele. La lango seka al blato. Saharo. Se almenaŭ unu guto da likvaĵo... iu ajn... unu pluvan guteton. Ja eĉ la herbo reviviĝas post la pluvo... Eble unu guteto de roso reakceptus la memoron? Estus iom pli malpeze, iomete pli facile. Kaj la kapo. Kaj mia kapo. Kial ĝi tiom doloras? Sed ĝi ne doloras. Doloregas! Ĝi rompiĝas! Kaj mi ne scias kio estas pli malbona: Saharo en mia buŝo aŭ tiu ĉi terura kapdoloro? Nekredebla doloro. Mi estas tiel doloranta, ke apenaŭ povas moviĝi. Senĉese io zumas kaj tondras en mia kapo. Ĝi pulsas onde. Ne sonorilegoj, ne artileria kanonado... De kie ĝi venas? Kial? Kio okazis? Sed mi vivas! Mi sentas doloron — tio signifas, ke mi vivas. Ĉar kial mi ne vivus? Tiom da demandoj. Respondojn el nenie. Mi pensas, ke mi ege ebriiĝis... Tio klarigus ion. Sed tio estas nenio nova. Ja ni ofte tiel drinkadis... Ĉiam ekstreme. Ho, kiel akre! Kaj ĉiam pro iu okazo. Drinki sen okazo - estas ebrieco. Kaj ni

ja ne estas drinkuloj! Ĉiam estis okazo. Kaj poste ĉiam ni estas sekigitaj senkompatate. Ha, kiel tiam gustumis kefiro, acida lakto, kukuma suko! Kaj se estis fojfoje biero... Ho, Dio! La botelo estis malplenigita en sekundo. Kolegoj helpadis kiel ili povis. Kie ili estas nune? Kaj kie mi estas? Kio okazas? Mi memoras, kio okazis antaŭhieraŭ, sed mi memoras nenion pri hieraŭ. Antaŭhieraŭ mi pasigis la nokton kun Nataŝa. Mi forgesos neniam ŝiajn belajn mamojn. Firmajn, formajn, allogajn. Kaj ne malgrandajn... Kaj Nataŝa ŝatis min. Eble eĉ amis? Ŝi asertis, ke mi estas alia ol la ceteraj. Ke mi zorgas pri mi mem. Ŝi ne sciis, ke mia patrino zorgis pri mia vestaĵo, kaj mi – por doni al mi ian elegantecon – drinkadis antaŭ renkontiĝo kun Nataŝa boteleton da parfumo. Tio desinfektis mian buŝon, donis bonan spiron, kaj mi ne bezonis lavi la dentojn. Parfumoj devus esti la plej malmultekostaj por ke ili enhavu multe da spirito. Sed tio estis antaŭ du tagoj. Kaj

kio okazis hieraŭ? Kio okazis hieraŭ? Kaj kie mi estas nun ĉiuokaze? Estas mallarĝe ĉi tie. Mi ne povas moviĝi. Nek per la piedo nek ... nu ... per la mano mi povas fari iom. Mi pensas, ke mi kuŝas sur la aŭtomobila planko... Ne sole. Mi palpis, ke kelkaj aliaj homoj kuŝas apud mi. Eble miaj amikoj? La aŭto veturas. Mi havas la impreson, ke ĝi veturas jam tre longe. Neniu fenestroj. Mallume. Kaj sufoke. Fiodoraĉas kiel vomaĵo... Sed... Mi komencas iom post iom rememori..... Kvazaŭ tra nebulo. La situo komenciĝas klariĝi. Kiam mi memoras, multaj aferoj evidentiĝas. Ni ĉiuj samaĝas, kaj hieraŭ tuta nia grupo ricevis alvokon al la armeo. Ni eĉ ne estas dudek-jaraĝaj - kaj tamen mobilizitaj al la armeo. Pro tio oni nomas nin "mobilkaj". Ni ne volas batali. Tiu ĉi ne estas nia milito. Sed oni ordonas al ni "savi" niajn fratinojn de la nazioj. Ni volis kune forfuĝi trans la limon. Kiun ajn! Sed antaŭ kelkaj tagoj oni fermis ĉiujn limojn. Laŭdire, grandegaj vicoj formiĝis ĉe la landlimoj. Tro multaj volis forkuri. Nur unu sola limo estas ankoraŭ "malfermita"! Sed ni povas transiri ĝin nur en kirasa trupveturilo. Kiel "mobilkaj"... Sed tio ja ne estas mia milito! Mi ne elpensis ĝin. Mi ne volas pafi. Mi ne volas mortigi. Kaj morti... Mi ne tre

komprenas, kial mi devus pafi "kunfratojn"? Mi estas pacifisto... Mi estas kontraŭ milito. Same kiel ĉiuj miaj drinkamikoj. Ni kune forbruligis niajn mobilizkartojn kaj ebriegigis nin ĝis senkonscio. Tial mi havas tiun teruran kapdoloron. Nu, mi supozas, ke verŝajne tio estas la kialo... Sed kiel sufoke ĉi tie. Kaj mallume. Mi sentas, ke mi baldaŭ vomos... Kaj hieraŭ... tamen nur hieraŭ... Mi memoras tre neklare, kiel ni akompanis Igoron ĝis lia hejmo... Kaj patrolo de la milita polico nin haltigis, saltante el ĝendarmeria aŭto. Ni promenis meze de la urbo kaj meze de la strato. Apenaŭ vivantaj... duone svenintaj... sur malfirmaj piedoj... Ni havis neniujn dokumentojn kun ni. Eble se ni ne urinus meze de la strato, sed bedaŭrinde... La komandanto de la patrolo ordonis "ĉiujn en la kamionon"! Kiam la grandaj ĝendarmoj ekkaptis nin, neniu el la kamaradoj havis la forton por defendi sin. Ili prenis po unu el ni - kaj ĵetadis en la aŭton. Kiam ili kolere kaptis min - la plej malpezan - kaj ĵetis min enen... mi sentis, ke mia kapo trafis ion forte. Mi pensis, ke mia kapo rompiĝos. Tia terura, terurega, obtuza doloro. Ĝi pulsas en ondoj. Kaj sango fluas. Kaj mi pensas, ke tiam mi perdis la konscion. Unuafoje... →

Malhele. Mallarĝe. Sen iu ajn sono... Kio okazas? Sango fluas. El mia kapo... kaj ĝi doloras terure. Kion? Denove? Kun granda peno mi sukcesis tuŝi la kapon. Ĉar la manoj rigidas kaj malmultas da spaco. Sed mi tuŝis... Nebblas! Mi estas pure razita. Mi pensas, ke mi verŝajne scias kialon. La filmo antaŭ la okuloj rapidigas la fluon. Tion jam estis. Mi vidis tion! Mi memoras, ke iam mi jam havis similan situacion. Sed tiam estis aŭto. Milita aŭto, kiu nin prenis el la strato, kaj ĉar ni ne havis dokumentojn - ili transportis nin al la kazerno. Tie oni ŝprucigis nin per malvarma akvo. Tio iom vekis nin. Oni ĵetis al ni kelkajn uniformojn kaj botojn. Ĉar estis nokto - ili ordonis al ni dormi. La filmo iom rapidiĝas. Antaŭ la okuloj pasas kelkajn tagojn, kiam oni donis al ni fusilojn kaj instruis pafi. La filmo subite haltas, ĉar estas tre malfacile ĉion kompreni. Tiam, pli frue, en tiu milita aŭto estis sufoke, sed mi povis iom turniĝi, kaj ĉi tie... Io grava en tiu memorfilmeto... Konversacioj kun Igor... Ankaŭ al li malplaĉas la kazerno ĉi tie. Kaj la tuta armeo. Ankaŭ li ne volas militi. Li konsideras, same kiel mi, ke tio ne estas lia milito. Li diras, ke ĉio pro malsanaj ambicioj de la aŭtoritatuloj (politikistoj, financistoj kaj

aliaj riĉuloj), kiuj kaptas junajn virojn al armeo, por ke ili mortigu aliajn junajn homojn dum militoj. Multe da junuloj mortas en militoj. Tro multe. Ne dekoj, ne centoj, sed miloj, dekoj da miloj de junaj viroj, kies vivo nur komenciĝas... Sed ili havas nenion por diri kaj laŭ ordono devas marŝi kontraŭ pafilojn, sub kuglojn... Ĉar generaloj kaj politikistoj tion deziras... Ili ordo-nas... Mi rimarkis, ke post tiu mallonga instruado en la kazerno, Igor fariĝis eĉ pli granda pacifisto ol mi. Li diras, ke iuj knaboj, kiuj estas plenaj de natura agreso, devus iri al la armeo. Ili mal-ŝarĝos sian energion tie. Tie estas ilia loko. Aŭ la "kontraktuloj"?... Ili volas gajni monon, laborante en la armeo kaj por la armeo - ili iru al la armeo. Se plaĉas la armeo - ili iru al ĝi. Sed ni - pacifistoj? Kial ni devas propran vivon redoni? Nian propran junan vivon? Ni konscias, ke ĉi tiu milito ne estas la nia... ke ĉi tio estas milita propagando prezentanta la realon tiel, ke juna homo ekmalamu la alian... trans la fronto... en alia uniformo... Igor rememorigas, ke kiam la milito komenciĝis, niaj trupoj transiris la limon de ilia lando, por savi niajn "fratojn" de ilia 'naziisma' registaro. Krome, se ni konscias, ke multaj

el la komandstabo (komandantoj de diversaj niveloj – generaloj, oficiroj) estas senespere nekompetentaj, kaj eĉ simple stultaj, kio kaŭzas nenecesajn homperdojn – la konkludo estas, ke oni devas timi armeon. Mi ne diras ĉi tie pri drinkuloj kaj seksemuloj inter oficiroj, sed ili ekzistas ankaŭ, bedaŭrinde... Ni ankaŭ sciis ĝenerale, ke por pli granda "kuraĝigo" ataki la malamikon – soldatoj ricevas vodkon antaŭ atako. Kaj... dum batalo, post linio de soldatoj, kiu atakas malamikon – malantaŭ de atakantoj iras specialaj murdistoj (gviditaj de politika oficiro) kiuj pafas al siaj retirigantaj soldatoj.

Post longaj, flustritaj konversacioj, Igor kaj mi venis al la konkludo, ke ni havas neniun elekton... Tuj, kiam ni ricevos armilojn — ni, kiel pacifistoj, likvidos la plej altgradajn oficirojn en nia atingo. Ĉu ne tiumaniere devas fari pacifistoj? Ĉar kion alian ni povas fari? Se aliaj ankoraŭ pensus tiel, eble estus pli bone... Sed nun, ĉu ili mortigos nin dum atakado de la 'malamiko', ĉu ni trafos minon, ĉu ni estos 'detranĉitaj' de snajpero – kia diferenco? Sed tiel... ni faros almenaŭ ion bonan... Sed ni devas atendi iomete. Mi havas altan

febron. Sanitaristoj venos por porti min al lazareto.

Denove paŭzo kaj la voĉo de Igoro diranta, ke iu subaŭskultis niajn diskutojn kaj raportis al la komandanto, kaj baldaŭ ili venos por ni... kaj eble ni estos juĝataj kaj verŝajne ekzekutitaj pro niaj planoj likvidi oficirojn... Ĝi estas terura! Kaj jes, vere, homoj eniras! Mi petegas, ke ili ne pafu! Ili diras, ke ili ne faros tion. Ke ili donas sian honoran vorton, ke ili ne, ili ne pafos. Kial mi ne devus kredi al ili? Ili diras, ke vere, ili devis raporti kie necesis, sed ni estu trankvilaj. Ili nur devas fari injekton por tiu alta febro. Do, ili faru... mi eĉ ne sentas pikon... Kaj eble tiam mi perdis konscion...

Malfacile estas spiri. Pli kaj pli malfacile. Ne estas aero. Mankas aero. Mallumo kaj mallarĝe. Kie mi estas? Kial mi ne povas turniĝi? Per fingroj mi sentas lignon. Flanke estas ligno. Certe tabuloj... Super mia kapo ankaŭ estas ligno. Mi povas leviĝi nur iomete... Mi batis la tabulojn super mia kapo.

Kaj malfacile spiri... Tre malfacile... Ege malfacile... La aero mankas al mi... Iuj steloj antaŭ miaj okuloj... iuj makuloj... iuj...

Marian ZDANKOWSKI



La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj aventuroj

Verko: *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj vojaĝoj*

Aŭtoroj: *Pluraj*

Eldonis: *Kavapech*

Ĉi tiu bela libro enhavas kolekton da noveloj, kiuj elektiĝis kiel finalistoj en la konkurso organizita de Akademio Literatura de Esperanto, en kunlaboro kun la retejo Bobelarto, en la jaro 2022 (Interkultura Novelo-Konkurso). Entute dekoj da tekstoj, plej ofte originale verkitaj en Esperanto. Tamen, troviĝas ankaŭ noveloj verkitaj en aliaj lingvoj (franca, itala, rusa kaj ukraina) kaj tradukitaj al Esperanto. La itala verkisto Paola Cereda estis la honora prezidanto de la tiujara konkurso.

Kurioza trajto de tiu bela kultura iniciato estas la fakto, ke oni proponas “temon” al la konkursantoj. Ĉi-jare, “noktaj aventuroj” estis la sugesto. Por 2023, la propono estas “La sekreta vivo de miaj najbaroj”. Sekve, tio kaŭzas, ke inter ĉiuj rakontoj troviĝas io komuna, malgraŭ la granda varieco de inspiro



kaj enhavoj en la noveloj. En ĉi tiu volumo, la noktaj scenejoj ja aperas preskaŭ ĉiam.

La lingva nivelo de la finalistoj estas eminenta, kaj pri la originaleco de la rakontoj oni same povas admiri. Kelkaj estas majstroverkoj de la novela arto,

(Daŭrigota sur la paĝo 24)

La 10-a Oficiala Aldono

Por citi la nomon de loko aŭ lando en Esperanto, oni povas uzi unu el tri solvoj: 1. citi la nomon en ĝia origina formo; 2. transliterigi la originan formon laŭ la esperantlingva alfabeto; 3. plene esperantigi la nomon. Ekzemple, la ĉefurbon de Rusujo oni povas nomi “Mockba” (origine, laŭ la cirila alfabeto), “Moskva” (transliterigita formo) aŭ “Moskvo” (esperantigita formo). Ifoje la esperantigita formo rilatas ne al la origina nomo, sed al nomo pli vaste uzata; ekzemple, la esperantigita formo de “magyar” estas “hungaro”. Uzi esperantigitan formon estas preferinde, pro ĝia universala komprenebleco.

La Fundamenta Ekzercaro ekde la komenco estigis du nomkategoriojn: la gentbazajn kaj la lokbazajn. Tiel, por certaj gentnomoj, oni derivas la koncernan landnomon per la sufikso “uj”: “La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo” (§40). Por aliaj nomoj oni agas inverse, uzante kiel bazon la loknomon kaj derivante la

nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso “an”: “La Parizanoj estas gajaj homoj” (§37). Se certa lando estas loĝata de pluraj gentoj, eblas nomi ilin kolektive per kombino de la sufiksoj “uj” kaj “an”: “Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj” (§37).

Por derivi gentbazajn nomojn, ankaŭ eblas uzi “land” anstataŭ “uj”, kiel ekzemple en “Svislando”, kio estas tute enorda. Aliflanke, multaj esperantistoj preferas uzi “i” anstataŭ “uj”: “Hispanio” k.s. Tamen ĉi tiu uzado ne estas oficiale aprobita.

Dum la evoluo de Esperanto, pluraj gent- kaj loknomoj enradikiĝis kaj oficialiĝis ĝis la 9-a Oficiala Aldono: ekzemple, “Brazilo” (8-a); “Usono” (9-a); tamen multaj restis neoficialaj, kiel “Argentino” aŭ “portugalo”. La 10-a Aldono, aprobita en la 24-a de septembro 2023, oficialigis entute 420 novajn radikojn, rilatajn al lokoj aŭ gentoj, kaj do prezentas gravan kontribuon al la pliriĉigo de la lingvo. →


Daŭrigo de la paĝo 23

(La 10-a Oficiala Aldono)

Inter la ĵus oficialigitaj nomoj, troviĝas kelkaj Brazilaj: “Braziljo”, “Fortalezo”, “Riodejaneiro” kaj “Sanpaŭlo” (la du lastaj sen dividostrekoj, ĉar iliaj konsistigaj elementoj ne estas esperantlingvaj!).

Mi trovis unu nekonsekvencaĵon en la listo de la 10-a Aldono: la vorto “Israelo” estas uzata por difini certajn loknomojn, sed ĝi mem ankoraŭ restas neoficiala, laŭ PIV kaj laŭ la listo mem. Ĉu pretervola forlaso?

Francisco Stefano Wechsler



Daŭrigo de la paĝo 22

(La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj aventuroj)

kiel la venkinto de la konkurso : “La babaŝa preĝkolĉeno”, de Rafael Noguerras. Cetere, ĉi tiu aŭtoro nuntempe elstaras kiel nova talento, ĉar premiita ankaŭ en aliaj konkursoj, interalie en la Belartaj Konkursoj de UEA, en 2023.

La noveloj estas ĉiam ne tro longaj, ĉar la regularo de la konkurso limigas la tekstojn al maksimume 2000 vortoj.

Tio faciligas la legadon kaj montras, kiel varie kaj interese oni povas verki atentokaptajn rakontojn en relative mallonga teksto. La legado de ĉi tiu libro estas do tre agrabla. Ankaŭ la eldono estas bela kaj bonkvalita. Tre rekomendinda libro!

Paulo S. Viana

10-a Tutamerika Kongreso de Esperanto
57-a Brazila Kongreso de Esperanto
41-a Brazila Esperanta Junulara Kongreso
8-a Cearaa Kongreso de Esperanto

2 - 5 Novembro 2023 en Fortaleza-CE, Brazilo.



<https://esperanto.org.br/kongreso/>